# ?urnalo La Jornada elstarigas la sukcesan viziton de Díaz-Canel al Meksiko



Havano, feb 13 (RHK) La meksika ?urnalo La Jornada publikigis ?i-diman?on ?efartikolon, en kiu ?i la?das la sukcesan oficialan viziton de la prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, al tiu lando, kaj la plifortigon de la amikeco inter amba? popoloj kaj registaroj.

Sub la titolo 'Meksiko-Kubo: kunlaboro kaj suvereneco', la ?urnalo elstaras la transdonon al la kuba ?tatestro de la Ordeno de la Azteka Aglo, okazo por memori la historiajn ligojn, kiuj kunigas amba? naciojn kaj reaserti la volon profundigi kunlaboron en reciproka profito.

La Jornada skribas, ke, donante al sia ekvivalento la plej altan distingon donitan de Meksiko al eksterlandanoj, la prezidento Andrés Manuel López Obrador (AMLO) ratifis sian profundan admiron por la kuba popolo pro ilia firma rezisto al la sie?o kun kiu Usono klopodis subigi ilin dum pli ol ses jardekoj.

La artikolo atentigas ke Meksiko ne forgesas, memoru, ke en la plej malfacila fazo de la san-krizo, Kubo sendis centojn da kuracistoj, kiuj estis en la unua linio de la batalo kontra? la kronviruso, ludis valoregan rolon por savi vivojn kaj helpis teni la sanan sistemon vertikala.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/313581-jurnalo-la-jornada-elstarigas-la-sukcesan-viziton-de-diaz-canel-al-meksiko

**Radio Habana Cuba**